


Jacopone da Todi:

LA PLORO DE LA MADONO

mezepoka poemo

en la itala kaj en Esperanto

tradukita de Enrico Dondi, aperinta en la «Itala antologio»



Giotto di Bondone (1266-1337), Gemäldegalerie Berlin, fotis: Miguel Hermoso Cuesta, el Wikimedia Commons

IL PIANTO DELLA MADONNA

Nunzio:

Donna de paradiso,
lo tuo figliolo è priso,
Iesu Cristo beato.

Accurre, donna, e vide
che la gente l'allide!
Credo che lo s'occide,
tanto l'on flagellato.

Madonna:

Como esser porria,
che non fe' mai follia,
Cristo, la spene mia,
om l'avesse pigliato?

Nunzio:

Madonna, ell'è traduto,
Iuda sì l'ha venduto;
trenta denar n'ha 'vuto,
fatto n'ha gran mercato.

Madonna:

Succurri Magdalena!
Ionta m'è adosso pena!
Cristo figlio se mena,
com'è annunziato.

Nunzio:

Succurre, donna, aiuta,
ca 'l tuo figlio se sputa
e la gente lo muta;
honlo dato a Pilato.

LA PLORO DE LA MADONO

Anoncisto:

Aũdu, virino dia,
kaptita filo via,
estas, Jezu' beata.

Venu, virino, ekkoni:
forte lin batas oni,
volas mortigon doni,
li estas skurĝegata.

Madono:

Kiel ajn tio estas,
se kulp' en li ne nestas,
kaj oni lin arestas,
Kristo, esper' amata?

Anoncisto:

Madon', perfido venis:
Judas' la vendon tenis,
tridek denarojn prenis
premio de l' merkato.

Madono:

Min helpu, Magdalena:
venis novaĵ' ĉagrena:
estas, laũ diro jena,
Kristo, la fil', batata.

Anoncisto:

Virino, help' necesas:
insulti lin ne ĉesas
oni, sed lin adresas
al juĝo de Pilato.

Madonna:

O Pilato, non fare
el figlio mio tormentare,
ch'io te pozzo mustrare
como a torto è accusato.

Folla:

Crufige, crucifige!
Omo che se fa rege,
secondo nostra lege
contradice al senato.

Madonna:

Prego che me 'ntennate,
nel mio dolor pensate;
forsa mo' ve mutate
de che avete pensato.

Nunzio:

Traàm for li ladruni,
che sian suoi compagnuni:
de spine se coroni,
ché rege s'è chiamato!

Madonna:

O figlio, figlio, figlio,
figlio, amoroso giglio!
figlio, chi dà consiglio
al cor mio angustiato?

Figlio, occhi iocundi,
figlio, co' non respundi?
figlio, perché t'ascundi
al petto o' sí lattato?

Madono:

Pilato, ne konsentu,
ke oni lin turmentu,
çar pruvojn mi prezentus:
li estas misjuĝata.

Popolo:

Al li la kruco-streĉo:
kiu sin diras reĝo,
agas, laŭ nia leĝo,
kontraŭe de l' Senato.

Madono:

Li aŭdu, mi esperas:
kaj vi ne plu koleras,
se vi nur konsideras
pri mia kor' premata.

Anoncisto:

Ŝtelistojn oni tiras,
kiuj kunule iras.

Popolo:

Kiu sin reĝo diras,
estu per dorn' kronata!

Madono:

Ho filo, filo, filo,
filo, lilia brilo,
ĉu eblas nun konsilo
al mia kor' ŝirata?

Ho filo, ĝojo sola,
vi restas senparola:
de l' nutra brust' konsola
vi tenas vin kaŝata.

Nunzio:

Madonna, ecco la cruce,
che la gente l'aduce,
ove la vera luce
dèi essere levato.

Madonna:

O croce, che farai?
El figlio mio torrai?
Come tu ponirai
chi non ha en sé peccato?

Nunzio:

Succurri, piena de doglia,
ca 'l tuo figliol se spoglia:
la gente par che voglia
che sia martirizzato!

Madonna:

Se i tollete el vestire,
lassatelme vedere,
come el crudel ferire
tutto l'ha ensanguenato!

Nunzio:

Donna, la man li è presa,
e nella croce è stesa;
con un bollon l'hon fesa,
tanto lo ci hon ficcato.

L'altra mano se prende,
e nella croce se stende,
e lo dolor s'accende,
ch'è più multiplicato.

Donna, li pè se prenno
e chiavellanse al lenno;
onne iontur'aprenno,
tutto l'hon sdenodato.

Anoncisto:

La kruco jen, Madono:
ĝin portas garnizono,
kie la vera bono
nun estas alfiksata.

Madono:

Ĉu kruc', vi persekutos
kaj l' filon ekzekutos?
Kaj kion vi imputos
kontraŭ senpeka stato?

Anoncisto:

Venu, jen kio estas:
la homoj lin malvestas
kaj ili pete gestas,
ke estu li najlata.

Madono:

Ho jes, lin metu nuda,
ke mi lin vidu tuta:
kiel pro l' bato kruda
li estas sangŝutata!

Anoncisto:

La manon oni kaptas,
ĝin al la kruc' adaptas,
per najlo fende traktas:
ĝi estas traborata.

Kaj jen la man' alia
fiksa al kruco fia:
doloro iĝas plia,
ĉar nun duobligata.

Jen fiksa krur' post kruro
sur ligno de torturo:
ĉiu artikstrukturo
estas en li streĉata.

Madonna:

E i' comenzo el corrotto:
figlio, lo mio deporto,
figlio, chi me t'ha morto,
figlio mio dilicato?

Meglio averiano fatto
che'l cor m'avesser tratto,
che ne la croce è tratto,
stace desciliato!

Gesù:

Mamma, ove si' venuta?
Mortal me dai feruta,
ca 'l tuo pianger me stuta,
che 'l veio s'è afferrato.

Madonna:

Figlio, che m'aio anvito,
figlio, pate e marito!
Figlio, chi t'ha ferito?
Figlio, chi t'ha spogliato?

Gesù:

Mamma, perché te lagni?
Voglio che tu remagni,
che serve ei miei compagni,
ch'al mondo aio acquistato.

Madonna:

Figlio, questo non dire:
voglio teco morire;
non me voglio partire
fin che mo' m'esce 'l fiato.

Ch'una aiam sepoltura,
figlio de mamma scura:
trovarse en afrantura
mate e figlio affocato!

Madono:

Jen mia plor' amara:
ho filo, filo kara,
ho filo senkompara,
de kiu mortigata?

Pli bone oni agus,
se oni min trasagus,
ol vin kruele plagus
sur kruco çagrenata.

Kristo:

Patrino, çu vi çea?
Çi estas vundo pleja,
çar premas min la trea
dolor' de vi montrata.

Madono:

Mi ploras ja sen çeso:
vi, filo, patro, edzo:
filo, kun çi krudeco
de kiu, fil', traktata?

Kristo:

Patrin', for la lamento;
vi restos por atento
kaj zorgo de la gento
en mond' de mi savata.

Madono:

Kion, ho fil', vi diras?
Kunmorti mi deziras:
mi restas, çis mi spiras,
nur apud vi kroçata.

En unu tombo sola,
fil' de patrino plora,
restos en kun' dolora
patrin' kaj fil' kompata.

Gesù:

Mamma col core afflitto,
entro le man te metto
de Ionne, mio eletto:
sia tuo figlio appellato.

Ioanni, esto mia mate:
tollela en caritate,
aggine pietate,
ca 'l cor s'ha forato.

Madonna:

Figlio, l'alma t'è 'scita,
figlio de la smarrita,
figlio de la sparita,
figlio attossecato!

Figlio bianco e vermiglio,
figlio senza simiglio,
figlio, a chi m'apiglio?
Figlio, pur m'hai lassato!

Figlio bianco e biondo,
figlio volto iocondo,
figlio, perché t'ha 'l mondo,
figlio, così sprezzato?

Figlio dolze e piacente,
figlio de la dolente,
figlio, hatte la gente
malamente trattato!

Ioanni, figlio novello,
mort'è lo tuo fratello:
ora sento 'l coltello
che fo profitizzato.

Che moga figlio e mate
d'una morte afferrate:
trovarse abbraccate
mate e figlio impiccato.

Kristo:

Patrin', dolora amo,
restos en via mano
la plejamat', Johano:
li estu fil' nomata.

Johan', mian patrinon
prenu êe vian sinon:
donu konsol-esprimon
al s'ia kor' s'irata.

Madono:

Filo, vi estas morta,
filo de la missorta,
filo de la senforta,
ho filo venenata;

blanka kaj ruĝa filo,
ho filo sen similo,
ho fil', kia helpilo
filo, al mi lasata?

Ho filo blonda, blanka,
filo, vizaĝ' senmanka,
filo, al vi maldanka
estis la mond' malŝata.

Ho filo dolĉa, bela,
filo de la sufera,
en manier' kruela
ho filo mistraktata.

Johano, fil' alia,
jen mortis frato via!
De l' profetita fia
tranĉil' estas borata

kun filo la patrino
en sama mort-destino:
restas en unu fino
patrin' kun fil' ligata.